

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



57a jaro n° 1
januaro - februaro 1965

Gevaert raportas

Reprezentadoj de nia filmo « Lumĝermoj »

Rimarkinde estas ke la unua 35 mm-kopio de la filmo ekhavis Esperantan komentarion. Tial, la reprezentado dum la Mainza kongreso estis la unua reprezentado de la filmo mem.

16 mm-kopioj estis plue sendataj al (krom al diversaj grupoj en nia lando)

- la 47a universala kongreso en Kopenhago 1962
- Esperantaj organizoj en Germanujo : Walsrode, Berlino, München, Nürnberg ; (plue rondvojaĝis la filmo tra 9 germanaj urboj, per la zorgo de Sro. Gellhaus el Luksemburgo).
- Finnlando : (Helsinki kaj pluraj aliaj urboj)
- Francujo : urboj, ne konataj de ni
- Nederlando : Leeuwarden — Den Haag kaj la Tejo-Kongreso en Amsterdam 1964.
- Usono : Harvard University — Massachusetts
Pittsburgh — Pensylvania
Hillsborough — California

Plue la filmo estis petata de organizoj el Argentino, Brazilo, Anglujo, Izraelo, Norvegujo, Svedujo, Hispanujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Japanujo, Rodezio, Sud-Afriko, Aŭstralio.

Por tiuj-ĉi landoj ne povis esti donata favora sekvo pro unu de la sekvantaj kialoj :


- neniuj kopioj estis libera por la dezirata dato
- la kopioj revenis ofte multe da tempo post la postulata dato, tio pro doganaj kaj ekspedaj malfacilaĵoj aŭ ĉar de la pruntekhavantoj la limtempoj ne estis respektataj.

Grava rimarko : Momente ne plu kopioj estas disponeblaj. Estas do neutile ankoraŭ peti pruntekhavon de la filmo.

E. D.

agrablan

novan jaron



47-a kongreso de B.E.F.
4-a markola kongreso

oostende

5-6-7/6/1965

pentekosto

ADRESO POR KORESPONDADO

Maertens G. Pr. Leopoldstraat, 51, Sint-Kruis (Belgujo).

JAM 61 PERSONOJ ALIGIS AL LA KONGRESO :

NOMO

S-ro Marmenout
S-ro Hartridge L.
S-ro Ch. Poupeye
S-ro Roose F.
S-ro Sniijkers Jos.
S-ro Maertens G.
F-ino Poupeye
S-ro Couwenberg J.
S-ro Dumarey A.
S-ro Eneman J.
S-ro Hinderyckx C.
S-ro R. Iserentant
S-ino Roose F.
S-ino Verbeke
F-ino M. Willems
S-ino L. Bernaerts
F-ino H. Brack
S-ro Castel
S-ino Castel
F-ino Castel
S-ro G. Debrouwere
S-ino Yv. Debrouwere
F-ino P. De Cock
S-ro De Cuyper
F-ino J. Chaineux
S-ino J. De Hondt
S-ino A. Denoël
S-ro Dro P. Denoël
S-ro I. Durwael

F-ino Enzlin
S-ino A. Fighiera
F-ino Bl. Geers
S-ino Mia Goossens
S-ro M. Guyot
F-ino M. Jacobs
S-ro R. Jacobs
S-ino R. Jacobs
S-ino M. Jaumotte
S-ro M. Jaumotte
S-ro Lernout
F-ino I. Maes
S-ino Mention
S-ino L. Merckx
F-ino Orsolini
S-ro E. Paesmans
F-ino Fl. Peeters
S-ino J. Plyson
S-ino L. Plyson
S-ino Ch. Poupeye
S-ro Fr. Schellekens
F-ino J. Terrijn
S-ro R. Van Eynde
S-ino R. Van Eynde
S-ro R. Van Humbeeck
F-ino Is. Van Parijs
S-ro H. Van Roye
S-ino M. Van Roye
S-ro H. Vermuyten
S-ino H. Vermuyten
S-ro J. Verstraeten
S-ro F. Volders

KAJ VI ?

KOLONIISMO KAJ KRISTANISMO

Kiam en la du lastaj jardekoj nombro de Afrikaj estintaj kolonioj iĝis sendependaj ŝtatoj, multaj Okcident-Eŭropanoj miris pro la fortaj ribelaj sentoj kaj eĉ eksplodoj kontraŭ la blankuloj kaj ankaŭ pro la tuj sekvintaj internaj bataloj inter-civitanaj. Tiuj okcident-Eŭropanoj ignoris kelkajn faktojn. La nigrulo-mizerulo-primitivulo pensis ke politika sendependeco tiuj alportos por li pliboniĝon multrilatan. Iom en la samspeca pensordo troviĝas la blanka « plenrajta » civilizita burĝo kiu estas ano de iu politika partio, kaj do voĉdonas por ĝi dum la reelektado, kaj kiu pensas ke la venko de lia partio alportos ankaŭ la ĉielon sur tero. (Tiu iluzio daŭras nur kelkajn tagojn; sed, strange, reaperas en la koncerna persono kiam ree alproksimiĝas la tempo de la reelektado!). La nigrulo vidis blankulojn; kaj tiuj blankuloj estis la mastroj. Do pereu tiuj blankaj mastroj. Rilate la duan fenomenon, la Okcidentanoj ne (sufiĉe) pripensas ke la gvidantoj de tiuj Afrikaj revoluciuloj estas tre ambiciaj tipoj, preskaŭ ĉiam diktatoremaj, kaj plej ofte inter si diferencaj rilate al politikaj kaj aliaj konceptoj. Estas ĉiam kaj ĉiam tiaj individuoj kiuj gvidas homamasojn. (Eble tamen ekzistas tre raraj esceptoj.). Do, kiam la malamiko estas venkita, ili inter si komencas batali. Sed ne temas nun pri tiu fenomeno.

Multaj Kristanoj (kaj ankaŭ ne-Kristanoj) miregis ke tiuj malamikaj sentoj de koloniitoj manifestiĝis ankaŭ, kaj tute ne mole, kontraŭ la Kristanaj misiistoj. Ili pensis ke devus resti ĉe la nigruloj nur sentoj de dankemo kontraŭ la misiistoj, kiuj ja tute ne volis profiti; kiuj alportis nur konsolon kaj helpon materiajn kaj spiritaajn. Efektive tio ŝajnas pli stranga kaj pli nekomprenebla. Ni mem konis multajn tiajn junulojn. Kaj efektive ili oferis vere ĉion por la nigrulo, kun eĉ ne la plej eta penso pri ia ajn profito. Tamen ili ankaŭ estis kaj estas persekutataj. Kiel klarigi tion?

Jam multajn jarojn antaŭ la dua mondmilito, Germana religiulo, Patro F. Stratmann o.p. montris klarege en sia majstroverko « Weltkirche und Weltfrieden » (Mondeklezio kaj mond-paco) ke ekzistas neforigebla kontraŭeco inter blankuloj kiuj predikas proksimumon kaj la samaj blankuloj kiuj militas kaj forrabas. Vi tuj kontraŭargumentos ke tiuokaze la nigruloj ne sufiĉe faras distingojn. Ili efektive ne faras; cetero malfacile povas fari. Despli ĉar ne ĉiuj de la koloniistoj estis banditoj, dum ankaŭ ne ĉiuj de la misiistoj estis anĝeloj. Do, estas tute nature ke tiuj blankuloj, en la okuloj de la koloniitoj, aperas kiel unu tutaĵo. Signifoplena estis la deklaro tiurilate, dum la mondkongreso de la Bramanoj kaj Aziaj Budistoj en Chicago al la adreso de la Kristanoj: « Vi sendas al ni viajn misiistojn por ke ili prediku al ni pri via religio. Ni ne neas la valoron de via religio. Sed post kiam ni dum du jarcentoj lernis vin koni, ni

vidas ke via tuta vivo estas en kontraŭdiro kun via religio kaj ke ne estas la spirito de vero kaj de amo kiu gvidas vin, sed jes la spirito de perforto kaj de profitemo... Tial vi neniukaze antaŭas nin, kaj tial vi devas lasi nin trankvilaj. »

Rilate la postmilitajn okazintaĵojn en la Afrikaj landoj, ni legas tre atentindan raporton en la Nederlanda revuo « Sjaloom », revuo de kunlaborantaj Protestantoj kaj Katolikoj, sub gvidado de la fama Patro Jelsma (adreso : Burgstraat 46, Gent). En la numero de majo '64 ni legas ke okazis pasintan jaron en Nairobi en Kenio la Tut-Afrika Kristana Junulara Kongreso. Tie oni eksciis ke en la tuta kontinento la enloĝantoj opinias ke ne estas diferenco inter blankulo kaj misiisto. Kiam misiistoj mem ne ĉiam povis distingi inter okcidenta kulturo kaj Kristanismo, ĉu mirigi ke la nigruloj ne kapablis distingi ? ! Okazis kelkfoje ke la predikoj, ĉu konscie nekonscie, helpis al la fiksado de politika povo de la blankuloj. La ministro de edukado de Liberia, Dr. John Paynes Mitchell citis diron kiu estas, laŭ li, konata al ĉiu Afrika knabo : Kiam la blankuloj venis, ili posedis la Biblion kaj ni la teron. Nun ni posedas la Biblion kaj ili la teron. Li plie argumentis ke la eklezio havis tro da ligiloj kun la koloniismo. Dr. Mitchell konsentis ke la misiistoj donis instruadon ; sed preskaŭ ĉiam senefikan. Efektive la nigruloj tiamaniere estis edukitaj ĝis alia socia tavolo kie ili tamen ne estis akceptataj de la blankuloj. La ĵurnalisto James Ngugi el Kenio defendis la tezon ke la Kristanismo en Afriko estis integra parto de la koloniismo. Predikante suferemon je la malriĉeco kaj obeemon je la blankaj mastroj, la misiistoj iĝis esenca subparto de la kolonia sistemo. Jen sonis la voĉo de Kristanaj Afrikanoj. Mi kredas ke ni nun kapablas kompreni la tragedion kiu okazis kaj ankoraŭ okazis tie.

F. R.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiataj senmastikaj
stangoj por kupoloj


Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

KRUCVORTENIGMO

SOLVO DE LA PROBLEMO N° 11

L I B E R T E M P O
O K O N E - T I A R
K O V - K E - S - N
O N I - O - O F - I
M O N O M A N I E T
O - E - P - D A T O
T A J D E B E N - L
I D O - N O - C I O
V E - E C - D - A G
O P E R A C I A T O

Solvintoj : el Antverpeno : S-ino. De Hondt kaj Sro. J.R. Van Eynde ; el Blankenberge : Sro. M. Van Mullem ; el Bruĝo : F-ino. M. Willems kaj Sro. R. Iserentant ; el Bruselo : S-ino. J. Plyson ; F-ino. Sim. Opsomer ; S-ro. M. De Neyer ; el Ekeren : F-ino. El. De Coene ; el St-Gillis-Dendermonde : Sro. Petro De Smedt.
Lotumado havigis la libropremion al F-ino. Sim. Opsomer.



No 12

DIFINOJ

HORIZONTALE :

- 1) festotago.
- 2) ioma sever' — moviĝ'.
- 3) sufikso — konforme al la lego-scienca — muziknoto.
- 4) scienco.
- 5) anagramo de regnestro — doktrin'.
- 6) maljesi — movigilo.
- 7) tiri post si — prefikso.
- 8) franca kavali(in)o — sent' — kafuj'.
- 9) malsaneca ĉelaro.
- 10) ne tradukitaj.

VERTIKALE :

- 1) bela floro.
- 2) mambesto.
- 3) sufikso — turni al difinita regiono.
- 4) malsupraĵo de pordo — F + ... = muzika verk'.
- 5) malplenaĵo — Usona urbo.
- 6) E + = forto — pagll'.
- 7) nekredanto — egipta dio.
- 8) elektra unuo — teksaj'.
- 9) demanda aŭ relativa — ripetita.
- 10) konformaj al la tradicia doktrino.

- N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.
2) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
3) Sendu NEPRE vian solvon al : Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Bruĝo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.



RECENZZOJ

PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO : La Vorto kaj la Frazo.

De K. Kalocsay kaj G. Waringhien. 3-a kompletigita eldono : 2-a kajero.
Eldonis : Esperanto-Propaganda Centro, Milano. 1964.
Broŝ., p. 183-362 ; 22 x 14,5. Prczo : 150 F

La dua volumo de P.G. pritaktas la sintakson, la pli komplikan parton de la gramatiko. Tiun, kiu esploras la rilatojn inter apartaj vortoj, kunigitaj por la esprimado de ideoj, — la interrilatojn de vortgrupiĝoj, ligitaj je propozicioj por esprimado de opinioj en pli-malpli simpla formo, — la interrilatojn de tiaj propozicioj, konsistigantaj kompleksajn frazojn, esprimojn de pli kompleksa pensenhavo. La tuton kronas kelkaj konsideroj pri la Vortordo en Esperanto.

P.G. tre funde studas tiujn diversajn rilatojn, celante determini kiamaniere la lingvo-uzanto plej adekvate komunikas siajn ideojn, sentojn, prijuĝojn. Jen certe unu el ĝiaj elstaraj meritoj, kiun ni des pli volonte rekonos, ke nur esceptokaze ni trovas sintakson, eĉ nacilingvan, kiu tiel plene kaj trafe analizas la esprimvivecon de la lingvo.

Principe la P.G. priskribas, kelkfoje ankaŭ klarigas aŭ pravigas, kaj ĝenerale el la skribajoj de Z. mem induktas la normojn, kiuj regu korektan lingvo-uzon : la procedo de fidinda gramatiko.

Tio ne signifas, ke ĝi sklave sekvas la ekzemplon de Z. sur ĉiuj terenoj, sed ĝi male kritike kribras liajn tekstojn kiam lia uzado pruviĝas ne-unueca aŭ influata de slavaj idiotismoj, por eventuale mem rekomendi solvon, kiu al ĝi ŝajnas la plej konsilinda. Tiel ĝi, ekzemple, pro « gramatika logiko pledas por kondicionalo post kvazaŭ » (263). Sporade, pro plia klareco aŭ koncizeco, ĝi eĉ proponas novan formon, kvankam sen ia trudemo : nuraj sugestoj do. Ni citu : VIC (199.R.2) ; ESTA, ESTIEL (200. R. 2.) ; EK KE (252) ; HAVUNTE (257.I.) ; MALE KE (266.c.) ; INTE (271).

Okulfrape estas la rigora klasifiko de ĝia vasta enhavo. Tamen, ne ĉiam oni senpene trovas sian vojon al serĉata helpo. Oni komprenos ies heziton, se 140.R. parolas pri « personaj pronom-adjektivoj », aŭ se « agant-adjekto » (kies difinon li preterpase trovis en 208.R.1.) ŝajne identas kun « pasiva agant-adjekto » (155.R.2.) kaj kun « ag-adjekta » de 179.R.5. Se la konsultanto estas iom bonŝanca, li malkovros la regulon pri la uzado de la adjektivo kun finaĵo -E en 169.R.1 ; pri la kelkfoja interŝanĝebleco de « devas » kaj « U-modo » hazarde informas lin (almenaŭ parte) : 231.R.6. ; 240.R.1. kaj R.3., dum la tipa parolturno « mi havas ion por diri » kaŝiĝas en 268, sen ia mencio pri la ekvivalento « havi ion dirotan » kiun proponas P.V. sub « havi » kaj « fari ».

Aliffoje, la teksto ŝajnas nekompleta. Ĉu do, oni povus demandi al si, ĉu ĉe 232.II ne eblas « Tiu, kiu dirUS tion, ne mensogus » ? Ĉe 232.III. « demandaj pronomoj » ne estu pli ĝuste : « demandaj tabelvortoj aŭ ĉu » ? Ĉu fine de 257.I. la « indikativa » ĉefpredikato ne estu « ne-kondicionala » ?

Okazis ankaŭ, ke iu loko konfirmas la korektecon de difinita konstruo, dum en alia paragrafo, ofte paĝojn pli fore, ni ekscias, ke pro bonstileco ni tamen preferu alian parolturnon. Akuzativo-kaskado kiel «...ringon havantan la pezon de...», bonorda laŭ 128.3., fariĝas malbonstile peza en 184.R.2. Laŭ 174.I. oni povas diri ke « mi vidis la knabojn ludantaj », sed 233.I.a. deklaras tian konstruon pli peza. « Iru dormi » diras 186.I.b., sed laŭ 268 oni plej ofte aŭdas « mi venis por diri... ». « Li estas (tiu), kiu vin savis » laŭ 236.II, sed laŭ la nuna kutimo (47.2.a) : « estas mi, kiu faris... ».

Kvankam P.G. distingiĝas per sia komprenebleco, kelkaj lokoj vere neklaras. La regulo 248.R.4., ekzemple, estas nebule formulita. Same neklare : kial 185.3. pli favoras la interpozitivon « mano en mano » sen gramatika ligilo ol 313.3. de la dua eldono, kontraŭe de la principo en 187. Oni emas kredi, ke mankas pli ol la subjekto (167.a) en « For la neŭtralismon. Alten la piedojn ». Plie, la akuzativon ne pravigas 167.b., dum 165 montras « la kapoj dekstren ».

Mirigas, ke « emi » (sinonimo de ntr. inklini), « kuragi » kaj ntr. « kutimi » estas citataj inter la verboj kiuj povas havi alterne infinitivan aŭ substantivan objekton (181.2). Mankas ekzemplo por ilustru la enigman 134.R.1., kiel mankas en 134.dd. komparo de la netransformebla « la domo de la patro » kun « la patra domo » el 231.R.5. La ekzemplo « Vi ne malhelpu, ke ŝi resanktigu la patran domon » (231.R.5.) ne konvinkas : la volitivo « resanktigu » povus ja dependi de la imperativa senco de la frazo. « Ĉevalo kun granda ĉapo » konvenas sub 133.E.e. aŭ fariĝu « kun granda kapo » por resti sub 133.E.c. KE, subjunkcio, enkondukas suborditan propozicion. Tio akordiĝas kun 215.R., sed, strange, ne kun 215.B.

Tiu tria eldono estas plejgrandparte fidela represo de la antaŭa, eĉ se ĝi aldona plurajn ekzemplojn el la verkoj de Z. aŭ aldone registris kelkajn interesajn dirmanierojn kiel : « kiom mi scias... » (261.2.), « tiom pli, ke... » (225), « ... ĉe kiu okazo... » kun rilat-adjektiva KIU (226). Pli ampleksa estas la modifo pri « POR antaŭ infinitivo ». Reverkitaj kaj reordigitaj ankaŭ : la artikolo pri PO (133.I. kaj 207.B.), kaj precipe tiu pri KIEL en ĝiaj diversaj funkcioj (200.A. kaj sep novaj paĝoj en 262), en kiu P.G., sub la influo de la studoj de H.A. de Hoog pri Kia-ismo kaj Tiom-kiom-ismo, malakceptas la « tiom juna kiom mi » de la Amsterdama skolo, kaj korektas sian propran « li estas, kia lia patro », rekomenditan en la dua eldono. (390.A/c).

Ni rimarkis i.a. ankoraŭ jenajn modifojn : « La aŭtoro ŝajne mokas la legantojn de SIA libro » (161.II) ; « Mi sentis, KE mia kapo KVAZAŬ rompiĝis. » (230.R.1.) ; « Estis la unua fojo, KE... » (251.R.). La iam malaprobata frazkonstruo « Kion vi volas, ke mi faru ? » (230.4.) estas de nun konsiderata allasebla, sed kun kelkaj rezervoj. Oni tamen havas la impreson, ke tiu problemo ne estas sufiĉe ellaborita, ke la rezervoj estas tro severaj, ke posta eldono pli-largigos sian vidpunkton. Kiel ĝi ankaŭ iam ekvidos, ke en « baloj sekvis unu la alian » (163.1) ne temas pri reciprokeco.

Nekontesteble : P.G. estas ege riĉa fonto de sciindaĵoj. Sed pro sia strukturo ĝi neeviteble devis fragmente disjeti samspecajn rimarkigojn en plurajn subdividaĵojn de sia enhavo. Manko de sintezo pri kelkaj ĉefaj konstruoj perpleksigas la studenton, ĝenas la komprenon de la kerno pro la multeco de disaj detaloj. Tial ŝajnas dezirinde, ni kredas, kunigi en apartajn, kromajn artikolojn ekze ĉion kio rilatas al la infinitiva konstruo, la uzado de la kompleksaj verboformoj, la participa konstruo, la adjekta predikativo kaj ĝia duonfrato la objekta predikativo. Same kunigi ĉion kio concernas la funkciojn de « kontraŭ, kiam, ja ».

Eĉ plena gramatiko ne povus antaŭvidi kaj antaŭsolvi ĉiujn embarasojn de la studento, neniu dubos pri tio. Ĉar efektive ekzistas tiaj demandoj neresponditaj. Ekzemple. La solvo pri « sin- » aŭ « mem- » en kunmetitaj vortoj (160.I.) ne progresis post la dua eldono ; pri « aspekti -A aŭ -E » ne estas parolo en 170.2. Nenie estas dirite, ke post la kopulo « ŝajni » povas sekvi infinitivo, kvankam en la teksto de P.G. ni legas : ŝajnas havi (116.d.a. ; 180.b.), ŝajnas stari (91.R.2.), ŝajnas rilati (273.II.2.), dormi li ŝajnas (274.4.). Infinitivo post adjektivo estas malofta en Esp-o (145). Kio ne respondas al la lingvo-uzo en

naciaj lingvoj (glad, pleased, afraid to come, content, heureux de voir). Tial pli kompleta listo da adjektivoj (al kiu P.V. jam aldonas : feliĉa, libera) pli sekure nin informus. Noteto pri vortgrupo kiel « nenio nova », kies ekvivalento en iuj nacilingvaj gramatikoj estas konsiderata kiel postrestaĵo de « parta genitivo », ankaŭ povus utili, eĉ se nur pro ĝia karakteriza nevaria vortordo.

Koncerne la tipografian flankon : la neta preso tute kontentigas. Inter la kvardeko da preseraroj, eble nur kvin malĝustaj resendoj ĝenos la serĉanton, des pli ĉar provizore (provizore, do supozeble ĝis aperos la Vortfarado kiel 3-a parto de la P.G.) la manko de detala indekso devigas lin elturniĝi meze de labirinto. Jen la ĝustigoj : en p. 250/222 legu 177.B.3. ; p. 281/1. : 144.a. ; p. 313/16 ; : 258.II. ; p. 313/18. : 230.3. ; p. 328/3. : 242.

Ne sen bedaŭro tamen oni rezignos pri la fortika papero de la dua eldono, pri ĝiaj « ventolitaj » paĝoj borderitaj per larĝaj marĝenoj, kadrantaj tekston pli facile studeblan pro pli malavara interspaco inter la linioj. La eldonisto ŝajne pretervidis, ke tia gramatiko estas esence laborilo daŭre-daŭre konsultata, kiun la studanto modlas laŭ sia propra personeco, en kiun li notas helpajn resendojn, dubajn esprimojn, komparojn kun naciaj lingvoj, k.t.p. Pro ŝparo de papero sturmi la leganton per dense vicigitaj aroj da linioj ne estas rekomendinda procedo.

Cio ĉi tio ne malhelpas tamen, ke ĉi tiu sintakso estas bonega gramatiko, kiu en okazo de dubo plej ofte provizas solvon plej eble pravigitan, do fidindan. Vere, se ekzistus nur tri libroj nemalhaveblaj por konsienca esperantisto, tiu sintakso estas unu el la tri.

F. Couwenberg.

18/12./64.

La Fratoj de la Karitato (Instituto St. Kamilo en Bierbeek apud Loveno), sub instigo de la meritplena dumviva membro de UEA, Frato Arni De Corte, eldonis pliajn kvar broŝurojn.

« Godelieve, la nobelino de Gistelo » (35 p.) estas verkita de ĉe ni bonfama F.R. Boschvogel (= arbarbirdo), pseŭdonomo de la instruisto F. Ramon. Li priiraktis jam multajn temojn el nia Flandra historio ; kaj li faras tion speciale por la gejunuloj. Tie-ĉi li iom romanigas historian okazintaĵon.

Cu estas vere ke la Katolikismo malestimas la korpon ? » estas 24 paĝa traduko de franclingva verketo de Georges Taymans. Ĝi plej taŭgus por multaj mallarĝmensaj religiulinioj kiuj, en la praktiko, donas netan impreson pri stulta malestimo de la korpo. Cetere, se kelkaj sentas la neceson eldoni tian skribadon, tio devas havi kaŭzon ; kaj tiu kaŭzo estas ke, ĝis nun, en la katolika kampo, multaj efektive ne havis la ĝustan starpunkton.

En alia broŝuro, nur 16 paĝa, la Jezuito Patro Lelotte priskribas la rolon de la Virgulino Maria en la katolikaj kredo kaj vivo.

La sama Patro Lelotte S.J. verkis pli ampleksan broŝuron (57 paĝan) « Perspektivoj » en kiu li montras la idealan kristanon : alia Kristo, ĉiam ĝoja, fermita al la peko, sed malfermita al la multaj homaj problemoj, progresema, ankaŭ anime, korpe kaj mense. Precipe tiu lasta eldonaĵo entenas multajn valorajn pensojn. Ni do absolute rekomendas la legadon. Laŭdon kaj dankon al la tradukinto de tiuj kvar : Frato Leotadio de Ruyver.

« LA PENDOLO KIU KURACAS », « LE PENDULE QUI GUERIT », Misteroj kaj mirakloj de la teleradiestezo, kaj de la oligoelementoj, de Maurice LAVARENNE, eks-profesoro ĉe la Beletra Fakultato en Clermont-Ferrand, Francujo. Franclingve kun resumo en esperanto. 160 p. Prezo : 8,40 francaj frankoj. Mendebla ĉe la aŭtoro, 66, rue Blatin poŝteĉkonto 283-25, CLERMONT-FERRAND.

La verkinto, kiu instruadis dum kvindek jaroj, rimarkis, jam preskau tuj ĉe la komenco de sia kariero, ke la laboro kaj la karaktero de liaj lernantoj dependas principe de ilia farto. Kaj tio tute nature alkondukis lin al la studado de diversaj metodoj medicinaj, ne tre konataj, sed kiuj ŝajnis al li tre efikaj, speciale homeopatio kaj naturismo, kiujn li jam priskribis en antaŭaj verkoj. La nuna libro estas dediĉita al radiestezo, kaj pli speciale al teleradiestezo, kiu ebligas analizi el malproksimo, ekzemple per nura tufeto da haroj, la sanstato de ĉiuj organoj de iu persono, la mikrobojn kaj toksinojn, kiuj povas difekti liajn humorojn, liajn mankojn koncerne mineralojn kaj vitaminojn.

La homa korpo ŝajnas kunmetita el ĉiuj kemikaj konataj elementoj, inter kiuj kelkaj troviĝas en ĝi nur en apenaŭaj kvantetoj (oligoelementoj). La manko aŭ la nesufiĉeco de unu aŭ kelkaj el tiuj elementoj naskigas humoran malekvilibron, kiu tradukiĝas en la gravaj kazoj per iu malsano, sed en multaj kazoj nur per malagrablaj sentetoj, per la nepovado fiksi la atenton (kalkulo-kaj ortografio-eraroj), malbona memoro, karakteraj malvirtetoj (kolereco, ĉagrena silentemo, timemo, emociemo, mallaboremo, k.t.p.) Donante al la malsanuloj la mineralojn kiuj mankas al ili, oni restarigas la humoran ekvilibron, kaj la sano refariĝas normala. Speciale la karaktero kaj la lernemo de la infanoj tiam kontentige transformiĝas.

Unu el la ĉapitroj estas dediĉita al la mallaŭdantoj de radiestezo, inter aliaj Auguste Lumière, Jean Rostand, Marcel Boll, k.t.p., kiuj kalumniis ĝin certe nur tial, ke ili ne sufiĉe studis.

La dua parto de la libro detale raportas pri multaj kazoj de resaniĝo akiritaj per la prezentita metodo : senatenteco, emociemo, matematika senkapableco, tediĝo pri la lernado, malbona karaktero, nerva deprimado, cerba laciĝo, angoro, malĝajeco, manioj, geedza malkonkordo, anemio, laringito, adenoidaj vegetaĵoj, angino, skarlatino, kokluŝo, astmo, cistito, dismenoreo, sterileco, k.t.p.

La lasta ĉapitro konigas plurajn konstatojn kaj hipotezojn, interalie pri la verŝajna nocivo de la vakcinado.

Fine la verkinto rememorigas la ĉefan rolon de la glandoj digestaj (hepato k.t.p.) kaj endokrinaj, tro ofte perturbataj pro manko de diversaj mineraloj kaj pro ĉesto de toksinoj ĉu heredaj ĉu akiritaj. Li insistas pri la nepra neceso, por bone farti, obei la leĝojn de la korpa kaj morala higieno, kaj konkludas per tiu fundamenta maksimumo :

« Sanon oni ne aĉetas, sed meritas ».

M. L.

Ni ricevis unu ekzempleron de H.A. De Hoog : « Nia Historio » (1911-1961). Ĝi estas la historio de la KELI-movado. Broŝurita ĝi kostas 4.50 Ned. Gul. aŭ 18 st. ; bindita, la prezo estas 5.50 Gul. aŭ 22 st. Ĝi nombras 159 paĝojn kaj estas havebla ĉe la adreso Hogerbeetstraat 30 en Wassenaar.

LA REDAKCIO PETAS
ENSENDOJN POR LA
MARTA - APRILA numero
PLEJ LASTE JE LA 10.2.1965


Murkalendaro de V.T.B. prezo : 30 F. sed por la membroj : 25 F.

Kiel pasintjare la V.T.B. eldonis belan kalendaron prezentantan la beginejojn. La fotojn faris Herman Wouters el Wetteren, kaj la desegnaĵojn lia frato Edwin. Ni rekomendas, despli volonte ĉar ĝi estas nova efektivaĵo de organizacio kiu jam tiom faris por nia Nederlanda kulturo kaj kiu ankaŭ — kiel organizacio — subskribis la petskribon favore de esperanto al UNO.

Martinus : « La Sorto de la Homaro ». Eld. Martinus-Instituto en Kopenhago, 1964. El la Dana lingvo tradukita de ing. Ib Schleicher. 101 paĝoj.

Prezo 6.50 danaĵ kronoj.

Jen la deka el la serio de en esperanto tradukitaj libroj de la skribema spirita gvidanto Martinus. Ankaŭ tiu-ĉi estas kun tre granda materia zorgo eldonita ; kaj, unuafoje ĝi havas indksojn ; kio plifaciligas la studadon. Ĝi ja estas studolibro ! Denove la literatura Komitato de SAT kontrolis. La libro konsistas el 47 ĉapitroj, ĉiuj mallongaj kaj klare kompreneblaj. Siajn filozofiajn konvinkojn la aŭtoro apogigas sur la nuntempa evoluo de la homaro kaj la mondo. Tion lastan li unue priskribas. Poste li pritraktas en kio konsistas religio. Tiam li enprofundigas en la homan psikologion... kaj fiziologion (ĉap. 19). Poste venas konsideroj pri la «eterna vivo» ; kaj tie-ĉi montras influojn el la oriento. Sur tiu vojo li klarigas kio estas purgatorio kaj infero, laŭ liaj ideoj. Sekvas kelkaj ĉapitroj pri socio kaj nacio. Li primeditas la fenomenon de UNO. En lasta ĉapitro, ia formo de moralpolitika kaj baz-ekonomia testamento. Li skizas en 12 punktoj la sorton de la homaro. Sufiĉe riĉa enhavo kaj multaj pripensindaj sentencoj.



Kara mia, forirante al la Universala ni forgesis malmendi la laktliveranton !

« POLLANDO » eldonis Polonia Warschau en 1964. 260 paĝoj. Prezo nur 4 respondkuponoj.

Enciklopedieto pri ĉiuj aspektoj de tiu lando inter 1944-64. Multaj ilustraĵoj, statistikoj, unu landkarto. Riĉega fonto de informoj. Nur unu rezervo. Estas evidente ke la parto historio 44-64 ne povas esti kompleta nek tute ĝusta ; nek rilate la okazintaĵojn, nek rilate la aneksojn de teritorioj. La landoj inter Germanujo kaj Polujo apartenas al tiuj jam multaj en eŭropo kie okazis tiom da ŝtatŝanĝoj, tiom da subpremadoj ambaŭflanke, tiom da forĉasadoj ke estas preskaŭ nefereble por rekrei justan situacion. Kiuj volas sufiĉe detalan informon legu Dr. G. Schamelhout « De Volkeren van Europa en de strijd der Nationaliteiten » parto II, 1929 Eldono Wereld-Biblioth. Por havi tiun-ĉi libron, skribu al Pola Esp. Asocio Varsovio, ul. Nowy Swiat 27.

T. Nakamura : « Enciklopedieto Japana ». Eldono de Kosmo en Osaka 1964. 217 paĝoj. Prezo : 255 b. fr.

Japanujo, misteroplena lando. Kiel cetere ankaŭ Ĉinujo, Hindujo kaj la tuta malproksima oriento. Iliaj por ni tute strangaj kaj eĉ nekompreneblaj moroj, konceptoj, kutimoj, muziko, lingvostrukturo k.a. faras ke en la komenco de la pasinta jarcento iu imperiestro diris : ekzistas fakte nur du popoloj sur la tero, la orienta kaj la okcidenta popoloj. Kaj literaturisto diris en sama signifo : oriento estas oriento kaj okcidento estas okcidento kaj la du neniam renkontigos (= neniam interkomprenigos). Sed de post tiam multo ŝanĝiĝis. Venis post la ekonomiaj rilatoj, la turistaj, sciencaj kaj aliaj. Multaj aŭtoroj verkis kaj paroladistoj konferencis. Ankaŭ en la esperanto-mondo aperis revuoj kiuj konigas la orienton al ni. (Brila ekzemplo estas la revuo « Oomoto »). Jam multaj gejojanoj venis al ni (ekz. Joŝiko Kaĵino). Ili ilustris kunvenojn kaj kongresojn niajn. Tamen restas multo nekonita al ni de tiu foraj landoj. Jen T. Nakamura (ĉu filo aŭ parenco de Dr. Kijoo Nakamura, esperantisto de 1855-1930 ?) jam de 1961 en la supre menciita revuo komencis klarigi japanajn terminojn. La sekvo de tiuj artikoloj estigis la nunan enciklopedieton. Ĝi estas bonege eldonita, sur bela kaj fortika papero ; kun multaj ilustraĵoj. Oni nepre unue legu la antaŭparolon kaj la ĝeneralajn notojn. Estas en la Komenco leksikona listo esperanta — japana kaj je la fino estas indkso japana — esperanta. La libro ne entenas sciigojn kiujn oni ĝenerale povas trovi en aliaj enciklopedioj aŭ eĉ broŝuroj aŭ lernolibroj kiel ekz. pri ekonomio, geografio, demografio kaj similaj. Ĝi estas libro kiu klarigas al ni la spiriton de la japana popolo kaj ĝiajn manifestigojn : do kelkaj specifaj sportoj (mi miris ne trovi la vorton jiu-jitsu), religioj, la te-ceremonio ktp. Kelkaj artikoloj estas sufiĉe longaj ; despli bonaj. Post enrigardo vi konvinkiĝos ke la prezo ne estas tro alta ; ĉar estas bonega kaj belega libro (kiu havas ankaŭ sian propagandan valoron). Se ĝi havos la merititan sukceson, eble kreskos el ĝi ankoraŭ pli ampleksa, tiel nomata kompleta enciklopedio. Ni tre esperas tion.

L.L. Zamenhof kaj A. Couto Fernandez : « Esperanta-Portugala Proverbaro » kaj Artur Azevedo — en traduko de A.C. Fernandez : « Amo per Proverboj ». Eldonis : Liga Brasileira de Esperanto en Rio de Janeiro 1964. 126 paĝoj kaj 35 paĝoj. Prezo : 15 steloj por la broŝurita kaj 25 st. por la bindita.

La meritplena, bedaŭrinde jam mortinta esperantisto A.C. Fernandez komparis la proverbaron de Zamenhof al la Portugala kaj kunmetis libron, nur nun eldonitan, kie li apudmetis la proverbojn kun samaj signifoj. Sekvas indkso. En la dua libreto li tradukis iom gajan komedieton de Brazila aŭtoro, en kiu unu persono havas la manion ĉion diri per proverboj. La verkoj estas speciale interesaj por tiuj kiuj konas la Portugalan lingvon.

DISKOJ

1) « Nos premiers pas en Esp. » = disko pri elparolado. Eld. Editions Françaises d'Esp. à Marmande en Francujo.

Bonega disko, nerompebla. Jen la solaj rimarkoj : elparolado tro rapida ; hieraŭ, ĉielo kaj biero estas elparolitaj kiel hjerāŭ, ĉjelo kaj bjero ; nur unu fojon la akcento estas sur lasta silabo (en vorto : diris) kaj unu fojon sur la unua silabo (en vorto : ilia).

2) « Salutparoladoj dum la universala kongreso de Den Haag 1964 » Eldon. UEA R'dam 1964. Prezo : 1,50 Ned. Gl. aŭ 6 st. Daŭro : 15 min.

Estas nur partoj el tiuj mallongaj paroladoj. Bedaŭrinde estas ke tiuj paroladetoj plejparte ne konsistas el kernecaj signifaj diraĵoj. Sur la koverto trovigas listo de landoj kaj parolantoj. Imponas la fakto ke la lingvaĵo de ĉiuj tiel diversnaciaj personoj restas por ĉiuj tiel bone komprenebla ke oni tute ne povas diveni ilian naciecon. Ĉu la esperantistaro rajtas scii kial ne ekzistas sama disko por la kongreso de Sofio ?

3) « Festparolado de Dr. I. Lapenna » ; du diskoj ; daŭro : 30 min. prezo : 3 Ned. Gl. aŭ 12 st. Eldonis UEA R'dam en 1964.

Temas pri la parolado dum la un. kongreso en Hago. Ĉiuj scias ke liaj paroladoj estas modeloj de elokventeco ; kaj sendube tre multaj volos posedi tiun-ĉi specimennon.



KIEN ?

AL LA ENSKRIBO

POR LA OSTENDA

KONGRESO !!

KORESPONDANONCOJ.

S-ro B. Poprava - Zamenhofe 5.m.3 ZIELONA-GORA (Polen)
deziras interŝanĝon de P.M. kun belgaj samideanoj pri temoj : infanoj ;
pentristoj.

S-ro S.R. Kubiak - Mickiewieza 47 STAROCHOWICE (Polujo)
deziras interŝanĝon de PM kun seriozaj belgaj filatelistoj.

Mi estas 36jara Polo (viro) kaj mi volus havi en via lando iun kun kiu mi
povus esperantlingve korespondi.

Marian Jezyk GLIWICE Skrytka 299 Polujo.

Mia filo Andrĉ, 18jara, lernas nun la Francan lingvon en liceo kaj ŝatus
interkorespondadi kun iu, en la Franca lingvo. Tiu persono venu dum somero
en nia hejmo kiel gasto. Nia urbo Szeged havas 100.000 enloĝantojn kaj situas
apud rivero kun bela plaĝo.

Andrĉ Zsabo SZEGED Agyagos u. 6 sz. Hungarujo.

LA PETICIO AL U.N.O. FAVORE AL ESPERANTO

La estraro de UEA demandas ke oni ne tro prokrastu la alsendon
de la jam plenaj peticifolioj. Estas ja antaŭvideble ke en la lastaj
monatoj, la C.O. estos superŝutata per amasego da tiaj folioj. Tio
postulos tro da laboro en minimuma tempo. Tial ni petas al niaj ge-
membroj ke ili bonvolu sendi la ekzemplerojn al la du lingvaj sekreta-
rioj. Por la Nederlandlingva parto al S-ro Gr. Maertens, Prins Leopold-
straat 51 ; St. Kruis-Brugge. Por la Franclingva parto al S-ro De
Cuyper G., Rue de Dorlodot 66 ; Monceau sur Sambre. Ni baldaŭ
atendas ilin.

**ANTVERPENO
ESPERANTO-GRUPO
« LA VERDA STELO »**

Kunsidoj : Ĉiuvendrede en « Witte
Leeuw » Frankrijklei, 4 Je la 20,15a h.
Poŝtĉeknumero : 726.54 Deurne.

**GRUPA
VIVADO**

La 6an de novembro S-ino L. Bernaerts faris paroladon pri « Esperanto, Amikeco kaj Bonkoreco » en kiu ŝi raportis pri sia restado en Barcelono ĉe siaj hispanaj amikoj. Se iu, iam, uzis kaj profitis la eblecojn de Esperanto estis S-ino Bernaerts. Ŝi tion abunde rakontis per riĉa kaj kolor plena vorttrezoro dum ŝi konigis siajn multajn travivaĵojn en la lando de Don Kihoto. Aro da lumbildoj plej diversaj ilustris la tuton.

La 13an S-ino Mia Goossens organizis veran « Modeshow » (Modoprezentado) dum kiu 2 feinaj estulinaj Gerda kaj Yolande, per diina gracio, montris 40-on da plej diversaj virinvestaĵoj en ĉiuj formoj, lerte kaj metikone komentariitaj de la organizantino mem (novulino de antaŭ unu jaro) laŭ tre sprita kaj amuza maniero. Ŝi do plene meritis la laŭdajn vortojn de la Prez. S-ro M. Jaumotte kaj la aplaŭdon de la entuziasmigita publiko. Oni multe instigis al pliaj samaj tiaj programoj.

La 20an dum filma vespero S-ro R. Van Eynde montris dokumentajn kolorfilmojn pri la vivo de la Usona Prezidinto J.F. Kennedy. Ĉio tio memore al la unua datreveno de la murdo de tiu mondfamulo. Estis feliĉa kaj ĝusta elekto de S-ro Van Eynde kiu ege kortuŝis la publikon.

Dum la 27a S-ino Frieda De Roover konigis al atente aŭskultantoj la insulon Sardinio, kiun ŝi vizitis kun edzo kaj filo dum la pasinta somero. Ŝi agrable surprizis ne nur per la belegaj diapozitivaj memfaritaj kiuj vere atestas artan guston, sed ankaŭ pro sia objektiva rigardo sur la landon, la popolon kaj ties vivkoncepton. Tre rimarkinde estis ŝia lingva stilo kaj la modela prononcado !

La 4an de decembro S-roj I. Durwael, F. Jacobin (novulo kiu emas al regula kunlaboro) kaj H. De Roover prizorgis la Sanktan Nikolaa atmosferon kiu estis konkludata per sukcesa plena tombolo por kiu ĉiu ĉeestanto kunportis premion.

La 11an S-ro R. Jacobs, Prez. de la brusela grupo, donis sian kunlaboron al la grupa programo per parolado pri « Vojaĝo al Firenze », montrante samtempe memfaritajn diapozitivajn kiujn la publiko plene admiris. La stilo kaj la flueco de la lingvo multe aldonis al tiu belega vespero.

Mardon, la 15an, EKI-Zamenhofvespero organizata en la festsalono de la junulargastejo « Op Sinjoorke » en Antverpeno sub gvidado de la EKI-Prezidanto, S-ro M. Jaumotte, S-ro C. Borremans kunmetis la programon, parte distra, parte kultura kaj amuza. La popoldancgrupo « Rondinella », gvidata de S-ino J. Cramm, montris sian artan sencon per diverslandaj popoldancoj. La kanthorgrupo « Edelweiss », tre solene gvidata de S-ro C. Borremans, lia patrino : S-ino Borremans-Distelmans kaj S-ro M. Chovau, aŭdigis diversajn konatajn flandrajn kaj esperantajn kantojn tre ŝatatajn de la publiko. S-ro H. Vermuyten — solene kaj emociplene — deklamis poeziaĵojn de D-ro Zamenhof mem kaj ĉiufoje donis ankaŭ la tradukojn (de li faritaj) en flandran lingvon. Ankaŭ S-ro I. Durwael, kun varma voĉo, dediĉis poeziaĵojn al D-ro Zamenhof kiu vekis multan aplaŭdon kaj S-ro J. Verstraeten faris la festparoladon kiun li titolis « Doktoro Zamenhof kaj mi ». En ĝi li miksis personajn travivaĵojn el sia juneco kun la juna vivo de nia kara Majstro. S-ro M. Jaumotte konkludis la tuton kaj instigis al vizito de la libro-budo organizita de S-ino N. Balleux kaj S-ro J. Bonte en angulo de la salono kaj kies sukceso estis granda.

La 18an S-roj I. Durwael kaj H. De Roover kreis la kristnaskan atmosferon laŭ tutpersona koncepto: la unua paroladisto raportis pri Kristnaskaj kutimoj kaj folkloro en la nordaj regionoj de Nederlando dum la dua paroladisto miksis proprajn tekstojn kun tiuj el la nova testamento kaj akompanigis ilin per adoptita muziko plej solena.

Dimanĉon, la 20an posttagmeze en bele ornamita salono de «De Witte Leeuw» la «Kristnask-paĉjo» (S-ro R. Balleux) faris viziton al la 25 infanoj de La Verda Stelo kaj malavare disdonis donacojn kaj fraŭdojn. Li tre amike alparolis kaj har-karezis la junajn geknabojn. Antaŭe S-ro Van Eynde prezentis belajn, por-infanajn kolorfilmojn, kiujn ankaŭ la plenkreskuloj vigle admiris. La infanoj mem deklamis kaj kantis — multaj en Esperanto jam — dum S-ro M. Jaumotte funkciis kiel paroladisto-anoncanto. Festejo — en kiu la kukoj kaj ĉokolado — lakto abundis — okazon al la infanoj kontentigi la malsatan stomakon. S-ro Wim Verdyck, plenkonscienco, zorgis por la muzika sondekorio en stereo-formo kaj surbendigis diversajn okazantaĵojn de la programo reauditajtajn poste. Entute estis belega vespero: pro la infana entuziasmo, pro la publika intereso, sed precipe pro la nelacigeblaj preparaj laboroj de S-inoj M. Jaumotte, N. Balleux kaj F-ino H. Brack. En tiu senco S-ro Jaumotte parolis kiam li dankis ĉiujn kunlaborantojn al tiu belege sukcesinta infan-festejo.

Naskiĝo:

En la familio W. De Smet-Kriekemans infaneto venis pligrandigi la familian rondon por ĝojigi la vivon de feliĉegaj gepatroj kun gemelo. Cetere la fiera patro disdonis la tradician bapto-sukeraĵon en la grupa kunveno.

Ce Ges-roj D-ro W. Peeters-De Ketelaere 4a infano Bart (finfine fileto) sin anoncis je la ĝojo ne nur de siaj gepatroj sed ankaŭ de siaj fratinetoj. En la parenca familio H. Jacques-De Ketelaere same alvenis 4a infano, filineto Ilse. Ŝi estis bonvenigata kaj akceptata kun entuziasmo kaj amo kaj jam nun plene okupas la kuraĝan patronon kaj la tutan familion!

Al la fieregaj gepatroj kaj familianoj ni kore gratulas kaj deziras daŭran kaj sinceran bonfarton.

AKCIDENTO:

La 3an de decembro S-ro Fr. Schellekens estis viktimo de trafik-akcidento. Li rompis al si la kruron kaj devis resti en la malsanulejo dum kelkaj semajnoj kie multaj verdstelanoj lin jam vizitis. Feliĉe la resaniĝo evoluas en la bona senco tiel ke nia bona amiko jam nun estas hejme kaj atendas la forprenon de la gipsa bandaĝo. Intertempe li ja reprenis jam

siajn okupojn de UEA-Cef-delegiteco kaj ankaŭ — parte — tiujn de sia profesio. Al nia kuraĝplena amiko «Sus» ni elkore deziras plej baldaŭan kaj entutan resaniĝon!!

REGA SOCIETO BRUGA GRUPO ESPERANTISTA. Poŝtĉekkonto N° 4835.33.

La 17an de novembro, F-ino. M. Willemis interese rakontis pri sia libertempado en St-Gervais, Chamonix kaj Mont Blanc, kun montrado de multaj fotografiaĵoj kaj memorajaĵoj.

La 24an, estis la vico de F-inoj. I. Van Parys kaj Y. Poupeye interesi la ĉeestantojn per detala raportado pri ilia somerrestado ĉe la Lago de Garda. Belegaj kolordiapozitivaj ilustraĵoj ilian priskribon de tiu rava subalpa regiono. Lernigaj ludoj plenigis la kunvenojn de la 1-a kaj de la 22-a de decembro, sed la 8-an estis S-ta Nikolao, je kies honoro la ĉeestantoj alportis, dislotis kaj elvovis nekonatajn premiojn.

La 15-an de decembro, Zamenhof-tagon, la prezidanto, Ch. Poupeye, revivigis la memoron de la aŭtoro de nia lingvo.

Post la 22-an, la grupo libertempis ĝis la 5a de januaro, kiam ĝi vespere ekskursis al Oostkerke, por tie ĝui bongegan vespermanĝon en agrabla atmosfero de kampara restoracio.

La 11-an de januaro, la komitato kunvenis por difini la agadon por la nova jaro kaj la 12an de januaro, la prezidanto prezentis la programon al la ĉeestantoj.

Programo por estontaj kunvenoj

Ciumarde, je la 20-a, en «Srijdershuis» Hallestraat, N° 14, Tel. N° 347.98; dum la unua horo leciono de la elementa kurso; dum la dua horo:

26-an de januaro: Generala Jarkunsido. Raportoj kaj renovigo de la komitato.

FebRUARO: 2an: Konkurso pri eraraj desegnaĵoj.

9an: Parolado de S-ro. Ch. Poupeye: Verona, Padua kaj Venecio, kun kolordiapozitivaj. (2-a parto).

16-an: Legado kaj komentariado de «Sonorilo».

23-an: ĉe la vic-prezidantino S-ino. Verbeke. «Artkamenjo» St-Jacobstraat: Komentariataj kolordiapozitivaj pri Italujo.

25-an: (ĵaŭdon) «Kunveno de L.K.K. Ostendo en «Middenstandshuis».

Marto 2an: Karnavala festejo.

9-an: Skiferio en Arosa, kun kolor-

diapozitivaj: F-ino. Y. Poupeye.

16-an: Parolata gazeto.

23-an: Kunveno L.K.K. Ostendo

30an: Dikto, korektado kaj tradukado.

Familia Kroniko

KONDOLENCOJ:

Al S-ro. Daniël VANSTECHELMAN, membro de B.G.E., pro la morto de lia patrino: S-ino Clara Vanstechelman-Allemeersch (30-11-64).

Al Fraŭlinoj Isabelle, Yolande kaj Christine VAN PARYS, respektive sekretariino, komitatano kaj membrino de B.G.E., pro la subita morto de ilia karmemora patrino S-ino Julia Van Parijs-De Vrière (16-1-65).

Grupo «Paco kaj Justeco» Brugge.

Nia samideano Roger Iserentant ricevis la «Kruco de Kavaliro en la ordeno de Leopoldo II» kiel marko de danko pro faritaj servoj al la patrujo.

Nia samideanino F-ino Simonne De Koninck ricevis ordenon pro 25-jara meritplena ofica servo.

Reĝa Esperantista Brusela Grupo.

Kunsidoj: ĉiulunde en «Monico Nord»

2. Brabant strato Bruselo-3.

La 5an de Oktobro, okazis la parolata ĵurnalo. La 12an nia prezidanto S-ro Jacobs parolis pri sia vojaĝo al Firenco; li tiuokaze vidigis al ni belegajn diapozitivajn kolorajn. La 19an nia perfektigkurso profesoro S-ro van der Stempel plibonigis nian lingvo-konon, instruante la transitivajn kaj netransitivajn verbojn kaj la 26an ni grupope aŭskultis «Ni kantu en Esperanto» usana disko, afable pruntedonita de S-ino Fighiera.

La 2an de novembro ne okazis kunveno pro la festo de Ĉiuj Sanktuloj; la 9an Fino Opsomer denove prelegis al ni interesan temon pri «Kongreso en Frislando»; la 16an S-ro Jaumotte regalis nin per instrua vojaĝo tra Jugoslavujon. Dank al S-ro Jaumotte kaj S-ro Schellekens kiu respondecis pri la teknika parto, ni ĝuis belegan veturadon tra diversaj Europaj landoj; la 23an okazis la ĉiumonata perfektiga kurso fare de S-ro van der Stempel kaj la 30an S-ino STAES, Elly vidis debaton pri la ege aktuala temo «Kulpa Junularo».

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel.: 16.89.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

Karlreĝa Grupa Esperantisto,
6, rue Paul Pastur, Charleroi.

En Septembro, F-ino Orsolini raportis pri la 4 tagoj pasitaj en Hago komence de la U.K.64, kaj post sia partopreno al la Kongreso de la Nord-franca Federacio en Caudry, ŝi entuziasme rakontis siajn impresojn. (Kompreneble akompanata de diapozitivaj).

Tre agrabla renkonto okazis dum Oktobro ĉe nia membro S-ro Delforge, kiu gastigis nin en sia bieno de Lobbes. Ni vizitis en Beaumont la turon «Salamandre» kaj reheimiĝis por vespermanĝi kaj trinki je la honoro de l'Esperanto.

En Novembro F-ino Orsolini invitis la klubanojn pendigi la noĉostangon en ŝia renovigita hejmo kaj post gustumado de aperitivo kaj zakuskioj, ĉiuj eliris por la mitulvespero organizita en restoracio de la «Alta Urbo». Eĉ kelkaj finis la vesperon en nova dancejo ĝis ĉirkaŭ la 2a h!

Le 11an de Decembro, filmamatoro S-ro Guérard, prezentis al ni belan filmon pri Walcourt. La unua parto estis dediĉita al la beleco de la arkitekturo kaj skulptaĵoj de la kanonika preĝejo kaj alia parto komentis la regionan folkoron okaze de la jara pilgrimado. Estis sonora filmo kies muziko konsistis el malnovaj kantoj luditaj per orgenoj. Kaj finfine okazis la plej grava evento, la 19an de Decembro: nia jara Bankedo dum kiu 20 gastoj kunmangis ĉinian menuon en ĉinia restoracio.

Ni ĝojis la partoprenadon de nia Generala Prezidanto S-ro Jaumotte kiu parolis por honorigi la eksigantan Prezidanton S-ron Paulus kaj por kuraĝigi la novan Prezidantinon F-inon Orsolini. Kaj la nokto gaje finiĝis per dancado en urba dancejo.

LIECO : Post la sukcesa kongreso en Wégimont, la grupo kunvenis regule. Krom la komitataj kunvenoj, ni citu inter la plej gravaj ĝeneralaj kunvenoj :

- 1) Raporto de F-ino Champy pri la aŭdienco ĉe Lia Sankteco la Papo, dum kiu oni preparolis la eblecon enkonduki esperanton en la Vatikanaĵ elsendoj.
- 2) Prelego de prez. Denoël pri « Anglujo, lando nekonata » ; kun filmo.
- 3) Prelego de F-ino Wolff pri : « Tourcheval, mirinda feriloko » ; kun diapozitivaj.
- 4) F-ino Champy : « Valencia, vojaĝaj rememoroj en Hispanujo ».
- 5) Raporto de Dr. Denoël : 1965, jaro de la internacia kunlaboro.

Krome, ni partoprenis esperantistan kunvenon de la « Senlimaj Trilandoj » en Visé ; ĉeestis 80 personoj. Pro laboraj aferoj nia sekretario S-ro Dengis devis forlasi sian postenon. Li estas anstataŭita de S-ro Kuster. Bedaŭrinde forpasis niaj geamikoj : S-ino Biquet kaj S-ro Fassotte, esper. depost 1936, kiun multaj el ni konis pro lia aktiveco. Feliĉe naskiĝis en familio Denoël la ĝis nun plej juna membro de la grupo : Christophe (Kristoforo) Louis (Ludoviko). Tiun lastan antaŭnomon li ricevis memore al la Majstro. Ĉiuj konas lian patron : Bruno Dencël.

raportis M. LEMME

MET WELGERENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GABARDIJNEN - IODENS
STYLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

KOMUNIKO de S.A.T.

A) La 38-a Kongreso de S.A.T.

okazos on KARLSRUHE, Germanio, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1965. **Adreso de la Organiza Komitato :**

Willi BANDEL, Marienstr. 88, 75-KARLSRUHE, Germanio.

Kotizo : (por ne-membroj de la Asocio) : dol. 4,50 (ĝis 31 marto) dol. 5,00 post tiu dato. Infanoj ĝis 15 jaroj ne pagas aliĝkotizon.

B) La 20-a Kongreso de SAT-AMIKARO

(por franclingvaj regionoj)

okazos en NANCIO, Francio, dum pasko : 17-20 aprilo 1965.

Adreso de la Organiza Komitato : Kongreso SAT-AMIKARO, Cercle du Travail, 1 bis rue Durieu, Nancy (M. & M.) Francio

Aliĝkotizoj : (membroj) 5 F. F., — ne-membroj 6 F. F.

manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2 Abdijsr. 57 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9 Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2